

## Festa Kunveno okaze de Zamenhof-Tago kaj la 75-jara jubileo de ILEI

Estimataj samideanoj,

Kun granda ĝojo ni informas vin pri virtuala festa kunveno organizita de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okaze de du gravaj eventoj: la **Zamenhof-Tago** (konata ankaŭ kiel la **Tago de Esperanto-libro**) kaj la **75-jara jubileo de nia organizaĵo ILEI**.

**Dato: la 15-a de decembro 2024**

**Horo: 13:00-14:00 UTK** (por ekscii ĝian ekvivalenton por diversaj horzonoj, bv. rigardi al <https://time.is/eo/UTC>)

**Zoom-ligilo:** <https://us02web.zoom.us/j/81096387166>. Nur se demandite:

Kunven-identigilo: 810 9638 7166

Pasvorto: la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj

### La programo inkluzivos ankaŭ:

- Kunlegadon de elektitaj kaj rekomendindaj tekstoj, prezentitaj de ILEI ([https://www.ilei.info/novajxoj/Tago\\_de\\_la\\_EsperantaLibro2024.pdf](https://www.ilei.info/novajxoj/Tago_de_la_EsperantaLibro2024.pdf) kaj <https://www.ilei.info/novajxoj/parto%20de%201910%20por%20kunlegado.pdf>) prezenti denove la kongreson kun preta retejo kaj aligxilo...
- Specialan proklamon de nova konkurso: "**La Instruistoj de la Jaro**", iniciatita de ILEI kun la valora subteno de TEJO. Tiu ĉi konkurso estas organizita speciale por agnoski kaj honori la elstarajn kontribuojn de niaj instruistoj al la Esperanto-movado.
- Prezenton de la retejo kaj Aliĝilo de la ILEI-Kongreso en Beogrado, Serbio 2025.

Ni kore invitas ĉiujn membrojn kaj amikojn de la Esperanto-komunumo partopreni en tiu ĉi evento, kiu celebros nian riĉan kulturon kaj la nelacigeblan laboron de niaj instruistoj.

Kun esperantistaj salutoj,

ILEI-Estraro